# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 25/04/2024 sescentokdekkvara eldono (unua eldono 26/09/2011)**



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

## AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 18-a de aprilo 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Caroline Turner

### (1) Esperanto Vizitkarto

(2)

Helen kreis tiun vizitkarton kaj proponis ke ni disdonu al ĉiu esperantisto tiun simplan vizitkarton.

Mendu ĉe la Melburna Asocio.




### (2) "Esperanto Essentials

estas pretaj …… bv mendi ĉe Joanne en Melburno

### (3) Somerkursaro 2025

La Adelajda grupo vizitis St.Ann's College… Bona impreso.

Ni atendas la prezojn …. Ankaŭ viziton ĉe CWA ….

### (4) Tri arkivaj labortagoj 24a-26a aprilo

Jes, ĝi okazos ….. Jonathan, Sandor, Terry partoprenos …eble aliaj el Sidnejo.

Kontaktu nin, se vi volas helpi.

### (5) Esperanto Domo en Melburno

La melburnanoj serĉas kaj serĉas …….

### Venonta estrarkunveno

Ĵaŭdon, la 2-an de majo 2024 je la 17:00 (16:30 en SA)

*Sandor Horvath*



# Interesa intervjuo


Antaŭ kelkaj jardekoj mi renkontis afablan francan kuraciston nomatan Jean-Luc Tortel.

Jean-Luc naskiĝis en la plej suda parto de Francio, kie oni ankoraŭ parolis la lingvon okcitanan. Kiel knabeto li parolis tiun lingvon hejme. Sed en lernejoj la norma pariza franca dominis.

Post sia abituro Jean-Luc iris studi medicinon en Parizo. Tie li ekde tiam ankaŭ loĝis kaj laboris, kaj intertempe preskaŭ forgesis sian unuan lingvon. Do post emeritiĝo li decidis fari kurson de la okcitana en la universitato *Sorbonne*.

La fakultato de la okcitana estis estrata de du sinjorinoj, kiuj mem ne estis denaskaj parolantoj de tiu lingvo. Kiam ili eksciis, ke Jean-Luc estas denaskulo, ili persvadis lin registri la prononcon de multaj vortoj. Li (re)lernis la lingvon kaj estis konsternita, ke junuloj naskitaj en lia iama regiono ne plu volas flegi la okcitanan.

Kion fari? Li, intertempe flua esperantisto, decidis provi konservi almenaŭ ĉefverkojn de sia unua lingvo per tradukoj en Esperanton. Jean-Luc tradukis kelkajn verkojn de *Frédéric Mistral* (1830 – 1914), kiu gajnis la Nobelpremion en 1904.



Ĉu Jean-Luc ankoraŭ vivas kaj tradukas, mi ne scias, sed la sola traduko lia, kiun mi legis, donis interesan bildon de la vivo en tiu suda regiono, kies lingvo iam produktis la unuan literaturon en latinida lingvo. *Trevor Steele*

# Mesaĝo de Marcel Redoulez 2024-04-21 Kara esperantisto

La preleganto de nia hodiaŭa sesio de nia prelegserio Marcel Redoulez ŝatas sendi la suban mesaĝon al ĉiuj. Amike, *Sandor Horvath*

Mi varme redankas al vi kaj la Aŭstralia Esperanto-Asocio pro via invito, kiu ebligis al mi hodiaŭ prezenti la kolektivan traduklaboron de kanzonoj « Brasenso en Esperanto » kadre de via ĉiumonata prelegsesio. Mi deziras ankaŭ danki la ĉeestintojn, kiuj diversloke tra la mondo partigis tiun komunan tempon.

Mi ne tre lertas pri la uzado de la zom-programo, kaj tial pardonpetas pro la kelkaj mallertaĵoj. Mi ekzemple ne sufiĉe rapide reagis al la skribaj mesaĝoj aŭ al la levita mano de Roland Rotsaert, kaj pro tio mi pardonpetas.

Min kortuŝis ĉies implikiĝo, kiam mi demandis pri la rekonitaj traduklingvoj, pri la nomoj de tradukintoj famaj aŭ ne, kaj pri la komentoj kaj demandoj fine de la prezentado.

Ja mi esperas, ke mi sukcesis transdoni al la partoprenintoj iom el mia pasio pri Brasenso kaj pri kunkantado en Esperanto.

Responde al demando de Raia : Kiel rete atingi la kanzonojn de Brassens registrita de Jacques Yvart? Per la ĉi-posta ligilo vi trafos i.a. *La pluvombrelo*
https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/jacques-yvart-92/3-brassens-plu-171.html

Kaj por pliaj demandoj pri tiu temo ne hezitu skribi al mi ĉe marcel.redoulez@wanadoo.frElkorajn amuzikajn dankojn, *Marcelo Redoulez* 22/04/2024

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

# 3ZZZ



En la elsendo de la 22a de aprilo 2024 vi audos pri movadaj eventoj kiel la tago de la gepatra lingvo, konsilojn por bone kaj sane maljuniĝi kaj informojn pri la bonoboj *Franciska Toubale*

# Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

Diverĝas kulturaj valoroj mondskale 18a de APRILO 2024 (*Roger Springer*)

# Pri la karikaturo en AE 683

Mi vidis pli longajn artikolojn kaj mi skribas ĉi tion kiel persono kies bofilino estas irana islamano. Roger sed mi pardonpetas pro tio, ke mi skribis ĉi tion en mia malbona Esperanto. Mi ĵus vidis la karikaturon en la bulteno de ŝajna Gazao kun Onklo Sam sidanta sur skatolo kun armiloj al Israelo. Ĉu vi ankaŭ pretus enmeti tian bildstrion de Irano sidanta sur simila skatolo kun la vortoj armiloj al murdado de islama teroristo Hamas? Kio pri iu diranta: “Lasu la Ostaĝojn foriri?” Ĉu mi supozu, ke la Esperanto-komunumo estas favora al iranaj malantaŭaj islamaj teroristoj (ne forgesante, ke Irano kune kun tiuj fame demokratiaj landoj Ĉinio kaj Nord-Koreio ankaŭ subtenas la rusan invadon de Ukrainio, kiun denove via informilo ŝajnas subteni). Murdu 1400 homojn inkluzive de la forbruligo de beboj, seksperforto kaj murdo de virinoj kaj maljunuloj? Kompreneble tiuj, kiuj alvokas la tiel nomatan palestinan ŝtaton (kiun ili jam pli ol unu fojon malakceptis, kaj kiu neniam ekzistis) ankaŭ subtenas la kompletan neniigon de la loĝantoj de la jura ŝtato Israelo, La Judoj, io kiu estis okazanta dum jarcentoj tra la mondo kun diversaj pogromoj kaj kiujn la nazioj provis kompletigi per siaj koncentrejoj? ho kaj ĉi tio inkluzivas la kunlaboron de francoj, poloj, ukrainoj, nederlandanoj k.a. en 2-a Mondmilito kaj oni ne forgesu, ke kelkaj el la organizantoj de la nazia holokaŭsto fuĝis al la Mezoriento por labori kun ĉi tiuj samaj homoj, kiuj klopodis, malsukcese. pereigi ĉiujn judojn.

Fine, kiel pri postulado, ke la islamanoj forigu tiun Moskeon de sur la Templa Monto en Jerusalemo, monto konstruita de judoj jarcentojn antaŭ ol Islamo venis el Arabio kun la glavo enmane por mortigi tiujn, kiuj ne konvertiĝis. Kaj kompreneble mortigi hodiaŭ ajnan, kiu konvertiĝas de Islamo al iu ajn alia religio. Venko al Israelo kaj la israela defenda armeo (IDF) daŭre sendas armilojn al Israelo IL kaj Ukrainio UA.



*Gordon Coleman*